


Svisa Esperanto-Societo

informas

jaro 2013 numero 2-a: marto-junio 2013
dissendo je la 1-a de marto



Fotis Claude Gacond

Printempo invitas al promenado !

Rememorigilo

SES informas

Redakcio :

Claude Gacond, Str. Chevreuils 14,
CH-2300 La Chaux-de-Fonds
Retpoŝto : gacond@bluewin.ch
Tel. : hejme: 032 926 52 32
ĉe CDELI : 032 967 68 42

Redaktaj kunlaborantoj:
Nancy Fontannaz, Stefano Keller,
Richard Schneller.

Redaktaj datlimoj

2013-3 : julio-oktobro :

julie 1, dissendo 15-an de aŭgusto.

2013-4 : novembro-decembro :

oktobre 10, dissendo 1-an de novembro.

2014-1 : januaro-februaro :

decembre 15, dissendo 10-an de januaro.

2014-2 : marto-junio :

februare 10, dissendo 1-an de marto.

Kotizoj al SES

Kun ricevado de *SES informas*

Fr. 10	Infanoj	ĝis 18 jaroj
Fr. 20	Junuloj	de 19 ĝis 29 jaroj
Fr. 35	Plenkreskuloj	ekde 30 jaroj
Fr. 50	Paroj	ekde 30 jaroj
Fr. 70	Patronoj	ekde 30 jaroj
Fr. 25	nura abono al <i>SES informas</i>	

SES-estraro

Mireille Grosjean, kunprezidanto, Grand-Rue
9, 2416 Les Brenets. Tel.: 032 932 18 88 kaj
079 69 709 66.

Retpoŝto : mirejo.mireille@gmail.com

Dietrich Weidmann, kunprezidanto, Archstr.
2, 8610 Uster. Tel.: 044 251 50 25. Retpoŝto :
info@esperanto.ch

Marie-Louise Mûnger, Rue Centrale 4, 2112
Môtiers. Tel. : 032 861 26 28.

Retpoŝto : ml.munger@bluewin.ch

Nelida Weidmann González, respondeca por
familiaj renkontiĝoj kaj aktivecoj. Archstr. 2,
8610 Uster. Tel. : 044 251 50 25.

Komisiito pri financoj : Hans-Werner
Grossmann, Esperanto-Servo, PF 262, 4132
MuttENZ. Tel. : 076 460 89 92.

Retpoŝto: esperanto-servo@bluewin.ch

Kontonumero de SES (POSTFINANCE)

Svisa Esperanto-Societo
2300 La Chaux-de-Fonds
17-581908-4
(por kotizoj kaj donacoj)

Konsultu la retejon de SES !

www.svisa-esperanto-societo.ch



Vivo de SES

2013 januaro-marto - Redaktis Claude Gacond

Ĝenerala Asembleo 2013

La Ĝenerala Kunveno de Svisa Esperanto-Societo SES
okazos sabate la 23an de marto 2013
en Staad (SG), oriente de Sankt Gallen

Preciza kunvena loko :

Hotelo Weisses Rössli (blanka ĉevaletto)
Hauptstrasse 69, 9422 Staad (SG). Tel: 071 855 15 15

Taga programo

Ekde 10h00 : alveno, kafumado, babilado.

11h00 precize : Komenco de la Ĝenerala Asembleo.

Tagordo :

- 1) Bonvenigo, kontrolo de la ĉeestantoj, anonco pri senkulpiĝoj.
- 2) Aprobo de la tagordo.
- 3) Elekto de protokolanto.
- 4) Elekto de voĉnombrantoj.
- 5) Evoluo de la membraro.
- 6) Aprobo de la protokolo de la Ĝenerala Kunveno 2012 (SESi 2012-2 p.3-6).
- 7) Vivo de la societo : aprobo de la estrarraporto (SESi 2013-1 p.4-9).
- 8) Konsisto de la estraro. Elektoj.
- 9) Elekto de komisiito pri ĝemelaj urboj.
- 10) Financoj : Prezento de la jarkalkulo kaj ĝia aprobo.
- 11) Elekto de kaskontrolantoj.
- 12) Projekto por 2013 :
 - a) Grundtvig.
 - b) SAT-amikara kongreso en Métabief, franca Ĵuraso.
 - c) Tutmonda sesio de KER ITK ekzamenoj.
 - d) Postsomera kunveno.
 - e) SFERO.

13) JES (junuloj), SIS (Svisa ILEI-sekcio), SAT, SAT-amikaro, Pasporta Servo k. s. Raportontoj bonvolu anonci sin al Mireille Grosjean antaŭ la kunveno.

14) Afrika Kongreso de Esperanto (AKE). Mireille Grosjean informas.

15) Buĝeto 2013 : Prezento kaj aprobo.

16) Diversaĵoj. Tie venu iaj informoj. Tamen tie ni ne povos trakti ion, kiu influas la buĝeton, ĉar ni jam estos aprobintaj ĝin. Diversaĵo de Mireille Grosjean : En la sekvaj kantonoj ne estas membroj de SES : AI, AR, GL, GR, NW, SZ, UR. Ni klopodu trovi tie novajn membrojn.

Proponoj :

Ili devis atingi Mireille Grosjean, pf 9, 2416 Les Brenets aŭ retpoŝte :

mirejo.mireille@gmail.com aŭ Dietrich Weidmann ĝis la 26a de februaro 2013.

Proponoj devas esti subtenataj de minimume tri personoj.

12h30 : Komuna tagmanĝo antaŭmendenda.

MENUOJ por tagmanĝo en Staad, Restoracio Weisses Rössli

Unua plado A : miksita salato « Rössli »

Unua plado B : supo el « Riesling » vino laŭ rejnvala maniero.

Dua plado, ĉefplado 1 : viandoplado laŭ kamparana maniero en mustarda saŭco kun rostitaj terpomoj kaj laŭsezonaĵoj legomoj

Dua plado ĉefplado 2 : senosta sandro kun citrono kaj kaporoj, seka rizo kaj laŭsezonaĵoj legomoj

Dua plado, ĉefplado 3 : miksita legomoplado spicigita per kareo, rizo kronforma kaj rostita banano kun aliaj fruktoj

Deserto a : krespo « Suzette » kun vanila glaciaĵo kaj alkoholaĵo « Grand-Marnier »

Deserto b : desertoplado « Rössli », surpriza deserto

La manĝo el tri partoj kostas po 25.— sen trinkaĵoj.

Mi elektas jene :

Unua plado.....

Dua plado, ĉefplado.....

Deserto

Nomo, Antaŭnomo.....

Loĝloko.....

Retadreso

Poŝtelefonnumero.....

Bonvolu anonci vian mendon al Mireille Grosjean antaŭ la 17a de marto !!

ĉu per poŝto (cp 9, 2416 Les Brenets)

ĉu per retmesaĝo (mirejo.mireille@gmail.com)

ĉu per telefono (079 69 709 66)

Kultura programo *Ê la Markthalle en Altenrhein*

Je la 15h00 ni ĝuos pri ĉiĉeronado tra tiu majstroverko : la **Markthalle** en **Altenrhein**. Temas pri bazaro-halo konstruita de la fama aŭstra artisto **Hundertwasser**. Tiurilate vidu fotojn tie :

<http://mirejo.blogspot.ch/2008/09/petit-voyage-en-suisse-alemanique.html>

La piedirado el la hotelo Weisses Rössli daŭras 10 minutojn laŭ ebena strato.

Konkurso

Dum la vizito en la Markthalle ni havos la okulojn plenajn je viglaj koloroj. Pro tio SES organizas konkurson kun diversaj premioj. Temo :

Kiu venos al tiu evento vestita de **PLEJ BUNTAJ VESTOJ KUN VIGLAJ KOLOROJ ?**

Ĵurio decidus pri premioj : unua, dua, tria kaj lasta.

Loĝado : Ĉar la loko estas tute ne centra en Svislando, tial eblas tranokti en la hotelo Weisses Rössli en Staad kaj en la hotelo Hecht en Rheineck (tel 071 888 29 25) aŭ en aliaj tiaj establoj de la regiono.

La organizanto : Mireille Grosjean, kiu pretas respondi al eblaj demandoj.

-oOo-

NOVA POSTENO : KOMISIITO PRI ĜEMELAJ URBOJ

UEA jam de jaroj sekvas tiun kampon kaj elektis komisiiton, temas pri Sinjoro Wu Guojiang (Ĉinio). Estas elstaraj kunlaboroj inter ĝemelaj urboj pere de la helpo de gesamideanoj. La komisiito kolektas informojn kaj anoncas ilin, tiel la agemaj esperantistoj povas uzi la spertojn de aliaj.

En Svislando estas multaj tiaj partneradoj, ĉu inter du svisaj urboj, ĉu inter svisa urbo kaj eksterlanda urbo. Estus bone esplori, ĉu en tiuj urboj esperantistoj povus ludi rolon. Tio estus kompreneble efika varbado por nia lingvo. Pro tio la estraro de SES deziras krei postenon. Se vi havas intereson pri tiu kampo kaj havas iom da tempo, bonvolu anonci vin al la estraro de SES. Elekto okazos dum la Ĝenerala Kunveno. Kun elkoraj antaŭdankoj !

INVENTISTA FOIRO EN ĜENEVO

Danke al la perado de Gabriel Marchon ni kontaktiĝis kun la redaktoro de la revuo de la franclingvaj svisaj inventistoj « IRO ». Ni povis plani komunan agadon : unue mi liveris artikolon pri Esperanto por la aprila numero de la revuo (eldonkvanto 20 000) kaj due li disponigos al ni tablon en la inventista foiro, kiu okazos en Ĝenevo, Palexpo, de la 10a ĝis la 14a de aprilo 2013. Sonia Daubercies kaj Charlotte Blanc Maillard deĵoros tie dum 5 tagoj. Ni elkore dankas al ili !! Estos tre bona okazo informi pri Esperanto kaj oni povas antaŭvidi, ke la publiko estos tute malfermita kaj scivolema.

Mireille Grosjean

SES - Jarkalkulo 2012, bilanco 31.12.2012 kaj buĝeto 2013

1010	Poŝtkonto (17-581 908-4)	273.49
1011	Poŝtkonto e-deposito (92-7737-1)	29'334.10
1060	Prunto al KCE	15'000.00
1090	UEA konto sesa-v (€ 10.19 je 1.218)	12.41
1100	Inventaro	463.00
1150	Bonhavo antaŭimposto	70.35
	AKTIVA SUMO	45'153.35
2000	Transaj pasivoj	565.00
2100	Kapitalo 1.1.2012 47'443.64 Plielspezoj -2'855.29 = kapitalo 31.12.2012	44'588.35
	PASIVA SUMO	45'153.35

			BUĜETO 2012	BUĜETO 2013
3000	Informado, varbado	5'204.50	5'000.00	5'000.00
3010	Laborrimedoj, omaĝoj	67.95	200.00	200.00
3020	Subvencioj, premioj, projektoj	950.00	1'500.00	8'000.00
3110	SESi (SES informas) elspezoj	1'930.05	3'000.00	2'500.00
3120	Kunvenoj kaj kunsidoj (ĜK, estraraj, regionaj)	391.40	900.00	900.00
3200	Kotizoj al UEA, EEU, KoToPo	165.00	250.00	200.00
3210	Administrado (afrankoj, telefonkostoj, ktp)	305.80	400.00	400.00
3220	Bank- kaj poŝtspezoj kaj kurzdiferencoj	133.79	100.00	150.00
3310	Valorigado de la elsendoj de Arthur Baur		9'500.00	9'500.00
3230	Donaco al KCE	450.00	450.00	450.00
3320	Agado/Festo 125	720.45	1'500.00	
3500	Diversaĵo	186.00	300.00	300.00
	ELSPEZA SUMO	10'504.94	23'100.00	27'600.00
4200	Membrokotizoj	4'690.00	5'000.00	4'500.00
4210	Abono al SESi sen membreco	550.00	500.00	500.00
4300	Donacoj, heredaĵoj	1'615.00	1'500.00	1'500.00
4500	Sponsorado/Vendoj FESTLIBRO Claude Gacond	142.00		
4600	Interrezoj: bankaj, poŝtaj kaj de KCE	652.65	650.00	550.00
	ENSPEZA SUMO	7'649.65	7'650.00	7'050.00
	Plielspezoj jarkalkulo / Plielspezoj buĝeto	-2'855.29	-15'450.00	-20'550.00

4.01.2013 / Hans Werner Grossmann

Tiuj valoraj libroj ne devas enpolviĝi sur breto !!

La Enciklopedio *Universalaj lingvoj en Svislando* aperis en 2006. La nuna prezo forte rabatita estas Fr 25.--. Uzu tiun eblon, aĉetu ĝin, donacu ĝin.

La Festolibro *Instrui Dokumenti Organizi* honore al Claude Gacond aperis en 2011. Ĝi entenas diversajn interesajn tekstojn. La prezo estas Fr 44.--. Aĉetu ĝin, donacu ĝin.

REZERVU TIUN DATON : 23an de junio !!

Profesoro KIMURA Goro instruas en du universitatoj en Tokyo. Ne estante ankoraŭ 40jara li jam estas « ordinara » profesoro, kio estas tre malofta fakto en Japanio. Lia fako estas lingvistiko, li multe esploris pri la soraba lingvo, minoritata lingvo en Germanio. Kompreneble la tertremo kaj cunamo de marto 2011 estis ŝoko por li, same kiel por ĉiuj japanoj ; li pro tio forte pripensas kaj agadas por energioŝparado.

Li restados kun sia edzino kaj 2 infanoj ĉe Mireille Grosjean fine de junio dum unu semajno kaj prelegos en Les Brenets la dimanĉon 23an de junio pri la temo :

Kiel Fukuŝimo ŝanĝis nian vivon en Japanujo.

Pliaj informoj pri loko kaj horo de la prelego sekvos per la retlisto « svislando » kaj per la kalendaro sur nia retejo www.svisa-esperanto-societo.ch/kalendaro/.

Mireille Grosjean

AKIRU ILEI-DIPLOMON PRI INSTRUADO !!

Temas pri unujara kurso malfermita al ĉiuj kaj organizita de ILEI kaj Universitato Adam Mickiewicz ; la partoprenantoj ne devas havis antaŭan universitatan diplomon. Tiu kurso ne okazas ĉiun jaron... do uzu la eblon aliĝi nun !

Dum unu semajno en septembro 2013 (13-20) kaj unu semajno en februaro 2014 (1-8) la kandidatoj devos ĉeesti kursojn kaj prelegojn en Poznan. La studado okazas ĉefe per la Reto, parte kunlabore kun edukado.net. Bonvolu konsideri, ke fine de la septembra semajno en Poznan okazos ARKONES, tre interesa kaj varia kultura evento.

Vi povas informiĝi pri tiu kurso skribante al Ilona Koutny, ikoutny@amu.edu.pl

Grava kongreso je Pasko

La kongreso de SAT-amikaro tre baldaŭ okazos en Métabief, Francio, tuj apud Vallorbe. Estas okazo por ni svisoj partopreni kaj internaciigi tiun dumpaskan kunvenon.

Alveno okazos vendrede la 29an aŭ sabate la 30an de aprilo.

Du duontagaj ekskursoj aperas sur la programo kaj sabate la 30an kaj lunde la unuan de aprilo : la vizito al Fuorto Joux, impresa fortikaĵo, kien Napoleono ĵetis la antaŭe tre ŝatatan generalon francan Toussaint Louverture el Haitio. Alia eblo estos vizito de alia fuorto, kie oni maturigas fromaĝon.

La tuttaga ekskurso okazos kiel kutime marde post Pasko, tio estas la duan de aprilo. Temas pri Tuttaga Trilanda Translimado al Francio, Respubliko Saugeais kaj Svislando. Ni estos gastoj de la Prezidanto de la Respubliko ! En Svislando ni vizitos la subterajn muelilojn de Le Col-des-Roches.

Riĉa kultura programo antaŭvidas premieron : « Ĉirkaŭ Karmenoj » de la koruso Interkant' kun solistoj, dancistoj kaj tekstoj en Esperanto. Plie kantos MANUEL, JOLANE, kaj ANJO AMIKA.

Do aliĝo nepras ! Kaze de bezono Mireille Grosjean povos helpi al vi pri tio.

KOTONA GAZETO NUMERO 2 2013-01-20

Grava pozitiva paŝo

Decido pri konsisto de Kongresa Organiza Komitato KOKo.

Jen kiu laboras kaj laboros ene de la KOKo :

Prezidanto : Privas Tchikpe, Kotonuo, Benino.

Sekretario : Latifou Gbadamassi, Lokossa, Benino.

Programo; Rilatoj kun UEA kaj Afrikaj Esperantistoj : Adjé Adjévi, Lomeo, Togolando.

Ekskursoj : Sébastien Essou, Kotonuo, Benino.

Akcepto, loĝado : Karlo Alofa, Kotonuo, Benino.

Organizado : Antaŭ- kaj dum-kongresa komunikado : Joseph Tchokpodo, Kotonuo, Benino.

Kotona Gazeto : financoj kaj rilatoj kun eksterafrikaj esperantistoj : Mireille Grosjean, Svislando.

Vic-respondeculo pri financaj aferoj : Pierre Houenavo, Lokossa, Benino.

La organizantoj estas la benina Landa Asocio ABeE, la Afrika Komisino de UEA kaj la NRO «Scio Sen Bariloj » kune.

Kongresaj kotizoj

La Komitato starigis la kotiztabelon por la kongreso.

Grava pozitiva paŝo : starigo de programo

Okaze de sia unua kunveno okazinta la 20an de januaro 2013 en JoCa, Kotonuo, (raporto jam pretas), la KOKo skizis tre riĉan programon, kiu antaŭvidas diskutojn pri agado en Afriko, ekzamen-sesion kun la tri niveloj de la Movadaj Ekzamenoj de ILEI, kurson pri la lokaj lingvoj "fon" kaj "adja", kulturajn eventojn kiel koncertojn, diversajn ekskursojn, kvizon kun premioj, ktp.

Reagoj tra la mondo

Ĉar estis 17 jaroj sen iu afrika kongreso, ĉar montriĝas skipo preta je laboro, la reagoj pri la okazigo de AKE estis en Afriko kaj ekster Afriko tre pozitivaj. En du eŭropaj landaj asocioj okazas pripensoj pri partnerado por financi alvenon de afrikanoj al Benino. Esperantistoj ekrilatis kun UEA-kunlaborantoj por demandi, kien ĝiri monon por subteni tiun Kongreson.

Kiel aspektos tiu kongreso ?

Jam ni scias, ke kelkaj afrikanoj kaj ne afrikanoj intencas partopreni. Jam la vicurbestro de Rufisko, Senegal, anoncis subtenon al unu aŭ kelkaj rufiskanoj, por ke ili partoprenu la Kongreson en Kotonuo. Jam ni scias pri diskutoj kaj

esploroj en Eŭropo celante subtenon al partopreno de afrikanoj al AKE. Se la ideo de partnerado progresos en la Landaj Asocioj ekster Afriko, la kongreso povos esti tre grava evento en la Historio de nia movado. Eble la subteno estos tia, ke per tiu helpo la organizantoj sukcesos inviti al Kotonuo la membrojn de Afrika Komisiono de UEA. La rezulto estos eta kongreso el 15 aŭ 20 homoj. Jam tia kunveno, tia fizika renkontiĝo en unu loko, dum pluraj tagoj, ebligos kontaktojn, diskutojn. Jam tio estus sukceso. Se la subteno el la Nordo estos pli forta, tiam eble po unu membro de ĉiu afrika Landa Asocio – UEA havas 17 landajn asociojn en Afriko, el 70 en la tuta mondo – la Afrika Kongreso de Esperanto (AKE) estos granda sukceso. Se esperantistoj el ne afrikaj landoj venos partopreni la kongreson kaj faros, ke la partoprenontoj atingus 50 aŭ 100 personojn, tiam estus giganta sukceso.

Konatiĝu kun Afriko

Mireille Grosjean abunde raportis kaj raportas pri Kotonuo kaj Benino sur sia blogo. Bonvolu rigardi la fotojn, legi la tekstojn : <http://mirejo3.blogspot.com> en novembro kaj decembro 2012. Tiel vi povos konstati, kiel aspektas la urbo, la kvartalo, la stratetoj, la domo JoCa, la hotelo Pac-haveno, ktp. Kompreneble en la blogo tra la fotoj mankas la temperaturo, la humideco, la bruoj, la odoroj. Pri la temperaturo kaj humideco direndas, ke la klimato estas agrabla ; ĝi tute ne similas al humidaj klimatoj kiel Japanio, Ĉinio, Vjetnamio. Tute ne. Humideco estas iom pli alta ol en la varmaj partoj de Eŭropo, sed restas meza kaj bone eltenebla. Nia kongreso okazos en seka sezono. Pri la bruoj direndas pri la pepado de kokoj kaj kokinoj frumatene tra la stratetoj. Povas aŭdiĝi blekado de ŝafo, kapro, bovo aŭ azeno, eble. Pri la odoroj nenio direndas.

La KOKo organizos ekskursojn. Tio signifas, ke vi povos sidiĝi en komforta moderna buso kaj veturi al Ouidah, Porto Novo, Ganvié, Abomey. Bonvolu esplori pri tiuj lokoj en www.eo.wikipedia.org, vi malkovros belegajn lokojn kun grava signifo por la lando Benino kaj por tuta Afriko.

Kompreneble rondveturado tra la urbo Kotonuo ne mankos. Vi povos vidi la tute proksiman oceanon, la larĝajn avenuojn, la havenon, la domon de la registaro, la multnombrajn ministrejojn kaj ambasadejojn, la Kongresan Palacon kaj la Konferenco-centron, la faman bazon Dantopka. Tamen nia kongreso okazos ne en la centro kun granda trafiko, sed en kvieta afrikstila kvartalo. Vi povos malkovri la vivo-ritmon de la afrikaj familioj. Pro tio direndas sugesto : venu kun viaj infanoj (se via financa situacio tion ebligas, kompreneble). Ekde la aĝo de dek jaroj infanoj kaj junuloj el la Nordo povus kapti la okazon de tiu kongreso por konatiĝi rekte kun afrikaj vivkondiĉoj, kiujn ili tre malbone konas tra televid-elsendoj. La kongresa organizado kaj kongresaj ekskursoj ebligos konatiĝon kun Afriko en tute sekuraj kondiĉoj. Ne forgesu, ke Kotonuo estas granda urbo kun ĉiuj servoj. Plie estos esperantista etoso kaj fruktodonaj kontaktoj kompreneble, kiel en ĉiu esperantista kongreso.

-oOo-

Kulturaj paĝoj

*Redaktas : Richard Schneller (rs), Rue Charles-Knapp 20,
2000 Neuchâtel, rischneller(ĉe)gmail.com.*

Pri la enhavo kaj la stilo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

Impresoj kaj esploroj pri la romano *Kiel akvo de l' rivero* de Raymond Schwartz

(3a parto)

*Tria parto de la prelego
de Christoph Klawe
dum la festado de la 125-a jariĝo
de Esperanto en CDELI
(1-an de septembro 2012)*




Vere frapis min epizodo, en kiu Trier, la urbo en kiu mi vivas, estas menciita ! Temas pri mencio de iu forno el « Quint apud Trier ». Revenante hejmen post duelo de biertrinkado inter lernantoj, la kunuloj iomete ebriaj sidas en dometo ĉe haltejo de urba fervojo. Tie Pierre travivas la jenon :

La forno el « Quint bei Trier », p. 241 :

« Pierre obtuzis en angulo, apud alta nigra, fera forno. Senpense. « Kion vi daŭre grumbladas ? », demandis Hugo, lia najbaro. Nur nun Pierre konsciis, ke ĵus li estis parolanta. Ankoraŭ li aŭdis sin ripeti « Quint bei Trier... Quint bei Trier... ». Kiel idioto. Unua-momente li kapablis respondi nek al Hugo, nek al si mem. Kion li fabelis ? Iom poste, vigliĝinte, li trovis la solvon al la mistero. « Quint bei Trier » oni povis legi, se oni bone rigardis, sur metalplato fiksita sur la soklo de la forno. Certe iu indiko pri l' fabrikloko. Pro la nigra ŝmiraĵo, kiun smirg-anstataŭe tro hastema pedelo estis frotinta sendiference kaj sur la fornon kaj sur la fabrikplaton, la literoj estis preskaŭ ne plu deĉifreblaj... »

Mi miris, ĉu tiaspecaj fornoj vere ekzistis. Sendube estus tro neverŝajna okazo, se Raymond Schwartz estus elektinta la vilaĝon Quint, kiu hodiaŭ estas antaŭurbeto de Trier, pro komplete hazardo.

Sed kiel mi eltrovis, vere ekzistis grandaj forĝejoj laŭlonge de la rivereto Quintbach, kiu donis sian nomon al la vilaĝo, kaj tiuj entreprenoj komencis produktadon de feraj fornoj en la jaro 1683 kaj tiu ĉesis nur en 1960. Hodiaŭ la fornoj el Quint estas aĵoj alte ŝatataj inter kolektantoj. Ne malproksime al Trier troviĝas la urbeto Konz, kie ekzistas granda muzeo kun ekspozicioj pri la malnovaj industrioj kaj la kamparana vivo en la regiono, la « Freilichtmuseum Roscheider Hof » (<http://www.roscheiderhof.de/home/index.php>). Kaj fakte, post iom da serĉado, mia edzino kaj mi trovis specimenon de tiuj fornoj :



Survoje hejmen de Berlino al Francio, oni rakontas al Pierre Touchard, la heroo de la romano, komikan okazaĵon rilate al la klopodoj de la germanaj okupantoj renomi la iamajn francajn vilaĝojn:

La stacidomo de Secourt, p. 322 :

« *« Kaj nun vi eble ridos, kiel oni ridas en la tuta regiono de du tagoj. Pro la nova nomo de la stacio. Ĝis antaŭ du tagoj ĝi estis Secourt. Sed nun la vilaĝo nomiĝas Unterhofen. Necesis tion skribi sur la fasadon de la stacidomo. En gotikaj literoj, nepre ! Sed la pentristo konas malbone la gotikajn literojn. Oni diras, ke inter la gotikaj f kaj s estas nur malgranda diferenco. Apenaŭ unu streketo. Bastien, la pentristo, tion ne sciis – aŭ li faris intence – li forgesis la streketon. Kaj jen, kion li skribis ! Komike, ĉu ne ? » Pierre legis la grandajn, nigrajn literojn... »*



Secourt : la malnova stacidomo.

Fakte, en Secourt la malnova stacidomo ankoraŭ hodiaŭ estas trovebla, nuntempe funkcia kiel farmdomo ; kaj se oni zorge alrigardas la domon, oni povas eĉ vidi la kvarangulon, kiun la iama ŝildo kun la nomo de la stacio postlasis !

La Seille estas malgranda, trankvila rivereto, kaj oni povas bone imagi, kiel Pierre nokte kaŝis sin en la arbustaĵo laŭlonge de la bordo antaŭ ol sekrete trapasi en Francion.



La fluejo de la Seille.



La plaĝo de Pointe Rouge.

Kiel akvo de l' rivero :
Enhavo – 3a parto

1939 :

25 jaroj pasis ! La dua mondmilito komenciĝis.

Ordiganta siajn aferojn, Pierre, nun asekur-agento en Parizo, rememoras la pasintecon. Li partoprenis la unuan mondmiliton. Li neniam ricevis eĉ unu leteron de Annemarie, sed li neniam forgesis ŝin. Tial li ne edziĝis. Peninte ricevi informojn pri ŝia fato post la milito, li aŭdis de sinjorino Geist, ke baldaŭ post lia adiaŭo Annemarie edziniĝis kun iu sinjoro von Bastrow, iama rivalo.

Nun Pierre estas mobilizita, sed baldaŭ iĝas militkaptito. En la militkaptitejo li surprize renkontas bonan amikon el Berlino, Paul Hansig, kiu kiel nuna komandanto de la ejo liberigas Pierre per ruzajo. Pierre kaŝnomite vojaĝas al Marseille.

1941 :

En Marseille, Pierre intertempe trovis laboron en kupon-oficejo. Varbite per amikoj, li aliĝas al la rezistomovado kontraŭ la germanoj.

1943 :

Tute ne atendite en la oficejo ekaperas Annemarie von Bastrow, naskita Balkenwirth. Ŝi ne tuj rekonas Pierre. Venkinte sian surprizon, Pierre malkaŝiĝas.

Fakte ankaŭ Annemarie neniam forgesis lin. Promenante laŭlonge de la plaĝo de Pointe Rouge, ŝi rakontas al Pierre siajn travivaĵojn.

1943 – daŭrigo :

Ne longe post la adiaŭo de Pierre, Annemarie eltrovis, ke ŝi estis graveda. Pro honto patriniĝi eksteredzine, ŝi konsentis edziniĝi kun sinjoro von Bastrow, kiu returnis el la milito grave vundita kaj mortonta, tiel plenuminte lian lastan deziron.

La filo – Paul – ne scias, ke lia vera patro estas franco.

Intertempe, Annemarie forlasis Germanion pro malkonsento kun la naziista reĝimo. Ŝi eĉ loĝis en Francio, sed la filo iĝis fervora faŝisma oficiro. Li malestimas la patrinon kaj evitadis kontakton. Pierre gvidas Annemarie al sia loĝejo ; sed tiun vesperon la Gestapo frapas. Pierre povas fuĝi, Annemarie estas arestata.

1946 :

La malesperinta Pierre ne retrovis la ŝpuron de Annemarie. Li revenis al la boparencoj de sia frato en Autrecourt, kaj helpas sur la bieno.

Kaŭze de siaj travivaĵoj dum la lastaj tagoj de la milito, Paul dume ŝanĝis siajn opiniojn. Pierre trovas Paul en militkaptitejo ĉe Metz kaj dungas lin kiel farmhelpanton, je la komenco ne revelaciante ke li fakte estas ties patro.

La 23an de decembro la du viroj kune aŭskultas radioelsendon – kaj hazarde ekscias la restadejon de Annemarie, kiu travivis la koncentrejojn kaj jam serĉadis Pierre.

1956 :

Pierre kaj Annemarie, Paul kaj sia franca edzino kaj ties infanoj feliĉe vivas kune en Autrecourt.

Kiel akvo de l' rivero :

Enhavo – 4a parto

En la fina parto de la romano Raymond Schwartz priskribas, kiel Pierre Touchard kaj lia filo Paul kune aŭskultas radioelsendojn kaj speciale ŝatas programon, en kiu « Jean Courtauld, la konata radioraportisto » detale priskribas la diversajn kvartalojn de Parizo.

Jean Courtauld, la konata radioraportisto, p. 474 :

« ... lastatempe ambaŭ sekvis kun intelekta frandemo la amuzajn felietonojn de Jean Courtauld, la konata radioraportisto. La nuna ciklo de l' babiladoj estis « Tra la kvartaloj de Parizo ». Jean Courtauld sciis kapti kaj teni siajn aŭskultantojn per la vigla stilo de l' improvizo... Li sciis desegni, per kelkaj strekoj, la apartan karakteron de ĉiu kvartalo kaj ĝiajn plej markantajn tipojn... Pro l' alproksimiĝo de l' Kristnaskofestoj – estis jam la 23a de decembro en la

postmilita jaro 1946 – Jean Courtauld estis hodiaŭ elektinta la Centrajn Halojn, tiun gigantan proviantaĵon, dank’ al kiu sin nutras ĉiutage la milionurbo. »

Post miaj ĝisnunaj esploroj, kiujn mi priskribis al la legantaro, mi estis konvinkita, ke ankaŭ la persono de la radioreportisto devus havi realan modelon. Mi trovis kolektanton de malnovaj radioprogramkajeroj, kiu eĉ posedas ekzempleron, kiu enhavas la programon ĉirkaŭ Kristnasko de la jaro 1946.



Sed ĝis hodiaŭ, mi ne aĉetis la kajeron – kaj sekve la demando, ĉu iu reala raportisto vere rakontis pri la kvartaloj de Parizo en la franca radio en la jaro 1946 kaj kiu estis la vera nomo de tiu viro restas enigmo solvinda en la estonteco...

Kiel akvo de l' rivero – unika majstroverko ne nur en Esperantujo, sed en la kompleta mondo de la literaturo laŭ la riĉeco en la priskribo de homaj karakteroj kaj sentoj, kiujn ĝi priskribas – ja temas pri amikeco trans la limoj kaj eĉ amo inter francino kaj germano, homoj antaŭ la fono de la grandaj kaj teruraj militoj, kiuj kruele skuis siajn naciojn, kaj tiamaniere montras, kiun rilaton kaj altestimom Raymond Schwartz kulturis por la bono en anoj de ambaŭ landoj.

Dank’ al Dio, hodiaŭ la tempoj pliboniĝis, kaj post ĝemelurbiĝo de Trier kaj Metz jam en la jaro 1957 Trier, Metz, Saarbrücken kaj Luksemburgo en la jaro 2000 kuniĝis al la tiel nomita « QuattroPole », kiu kune organizas kulturajn renkontiĝojn kaj internaciajn okazigojn meze de pacema Eŭropo.



Ĝemelaj urboj Trier, Metz, Saarbrücken kaj Luksemburgo.

Kulmino de la somera sezono en Metz estas ĉiujare la Mirabelfesto, kiam oni kune festas la novan rikolton de la tre bonaj mirabeloj, kiuj estas famaj en Loreno, per procesioj kun gaje ornamitaj ĉaroj kaj stilzitaj dancantoj tra la stratoj de la urbo.



Mirabelfesto : Metz, ĉiujare en aŭgusto.

Raymond Schwartz, kiu ja regule pasigis siajn feriojn en sia hejma Loreno, skribis tre belan kaj kortuŝan poemon, en kiu iu speciala produkto el la bongusta flava frukto ludas gravan rolon :

La pastro de mia vilaĝo

(El *La Stranga Butiko*)

*La pastro de mia vilaĝo komprenas,
Ke lumas pli hele ol pala kandelo
Sur vojoj de l' vivo afabla botelo,
Kaj tial li ofte ĉe glaso vin tenas.
Dum brava provtrinko en ombro de l' kelo
De gasto cedema konfeson li prenas,
Li patre admonas, pardonas kaj... benas
La brandoprodukton de la mirabelo.
La pastro de mia vilaĝo praktikas
La leĝon de Kristo kaj saĝe predikas,
Ke pufaj promesoj ne ŝtopas malplenon ;
Kaj pli ol kantikoj la fakto edifas,
Ke eĉ herezulo ĉe li ne soifas,
Sed trovas ĉe l' pastro ĉielspecimenon.*



Se vi iam havos la eblecon gustumi la lorenan mirabelbrandon, ne unu momenton hezitu !

Dankesprimo

Mi kore dankas al ĉiuj geamikoj, kiuj helpis dum miaj esploroj :

Ed Borsboom, Peter Fischer, Adrien Guinemer, Isa Hensel, Jean-Luc Thibias.

D-ro Christoph Klawe

	Fr 44.- →	
Tiuj du libroj estas aĉeteblaj en CDELI		
Fr 30.-		

Festolibro Gacond

Pri la artikolaro
Instrui Dokumenti Organizi
Edition Iltis, 2011



Recenzo de Luiza Carol

Tiu festolibro, kiu honoras la okdekjariĝon de unu el la plej elstaraj nuntempaj esperantistoj, estas vera trezoro de artikoloj pri ĉiuj agadkampoj, kiujn Claude Gacond riĉigis kaj riĉigas. Kontribuis al la libro 23 aŭtoroj el 12 landoj de 2 kontinentoj.

Mi ne prezentos kritikajn sciencajn analizojn pri la ege buntaj materialoj de la libro, ĉar tion mi malkompetentus fari, kaj de mi oni eĉ ne atendas ĝuste tion. Mi nur donos pri ĉiuj artikoloj po kelkaj ĝeneralaj informoj kaj eventuale aldonos miajn reagojn, emociajn kaj subjektivajn, kelkfoje eĉ rilatantajn al nur randa problemo. Mi esperas veki la scivolon de la legantoj pri tiu kleriga kaj agrabla legaĵo.

Pri la biografio de Claude Gacond

Enkonduke : « Servoprete via »
Stefano Keller

La enkonduko de Stefano Keller informas pri la vivo kaj la por-esperantaj agadoj de la jubileulo. La aŭtoro klarigas, ke li verkis la biografion de Claude Gacond « el la okuloj de kunlaboranto proksima, kolego, kiu akompanas lin jam de pli ol tridek jaroj en lia aventuro por-

esperanta, al kiu li ofte rakontis pri siaj vivo kaj travivaĵoj ». Tiamaniere, la teksto de la enkonduko aspektas kaj varme intima kaj plena de interesaj faktoj, gravaj por la historio de la Movado.

Jen kiel la biografio substrekas la grandan influon de Edmond Privat sur la pensmanieron de Gacond : « Kun granda intereso li sekvis la prelegojn de Privat, traktantajn i. a. la neperfortan luktadon de Mahatma Gandhi. Li ĉiam admiris la kapablon de Privat kunvivigi heterogenan partoprenantaron de sia prelego en harmonia kaj pacema, meditema etoso. El tiuj prelegoj Claude retenis la instruon : « Antaŭ ol kritiki kontraŭulon, provu meti vin en lian haŭton. Tiel vi pli bone komprenos lian vidpunkton. » » Kaj poste : « Claude Gacond avida aŭskultis rakontojn, opiniojn de Privat pri mondfederalismo, pri la zamenhofa homaranismo, pri la sorto de militrifuzantoj kaj similaj temoj. Li pli kaj pli konsciiĝis, ke Esperanto vehiklas neperforteman humanismon. »

La bonan influon de Gacond koncerne sociajn rilatojn Keller pri-skribas trafe : « Lia pacema kaj paciga sinteno enkondukis veran

interlingvistikan pacon. Laŭ li, ne nur inter la adeptoj de malsimilaj planlingvoj estis dezirinda la reciproka toleremo, sed ankaŭ en la esperanta komunumo mem, koncerne al gramatikaj kaj movadaj priksideroj. »

Keller aparte atentigas pri la fervoraj kaj sindonemaj agadoj de Gacond koncerne la Centron pri Dokumentado kaj Esplorado de la Lingvo Internacia (CDELI) kaj la Kulturan Centron Esperantistan (KCE) – tiuj estas la du famaj institucioj por Esperanto, kiujn li fondis kaj evoluigis –, pri lia tridekjara laboro ĉe Svisa Radio Internacia kaj pri liaj politikaj agadoj kadre de la socialdemokrata partio.

El la 20 artikoloj, kiuj konsistigas la festan kolekton, 17 pritraktas diversajn temojn, apartenantajn al la ĉefaj agadkampoj de la jubileulo, dum 3 artikoloj rilatas rekte al la agadoj de Claude Gacond. Tiujn mi prezentos nun, ĉar ili kompletigas kaj pliprofundigas la enkondukan biografion faritan de Keller.

**« La kleriga rolo de CDELI :
seminarioj kaj semajnfinaj
aranĝoj »**

Nancy Fontannaz

Tiu artikolo estas verkita, samkiel la enkonduka biografio, de persono kiu delonge kunlaboras kun Claude Gacond kaj konas lin tre bone. Fakte Nancy Fontannaz redaktas la historion de la centro CDELI, sed ties ekzisto estas parto de la vivo de Gacond. Diras Keller en la enkonduko : « De kvindekkvin jaroj la

laboro de Claude Gacond por CDELI estis ĉiam nesalajrata, malgraŭ tio li neniam ŝparis sian tempon kaj energion. » Kaj Fontannaz diras en sia artikolo pri CDELI : « ... ĝi ekzistas dank' al la longjaraj klopodoj de Claude Gacond. » Kunmetante la biografion de Gacond kaj la historion de CDELI, oni sentas, ke tiu donis al sia fondinto, evoluinto kaj evoluanto la idealan kadron por lia agado. Fontannaz priskribas tiun agadon tiel : « La bazo de lia agado ĉiam estis *informiĝi, kleriĝi kaj transdoni al aliaj, kion li lernis.* »

Prezentante informojn pri la kleriga rolo de CDELI, Fontannaz unue parolas pri la homo, kiu vivigis ĝin kaj ĝian bibliotekon. Ŝi ankaŭ parolas pri Svisa Radio Internacia, kie dum 30 jaroj estis elsenditaj precipe prelegoj okazintaj dum la studaj semajnfinoj en CDELI. Listigante la kulturajn agadojn en CDELI, Fontannaz mencias ekspoziciojn, libroarkivadon, publikadon de verkoj, sciencan esploron, instruadon (pere de studferioj, kursoj, studvesperoj, didaktikaj studsabatoj, kulturaj seminarioj, organizado de « Elementa kurso de Esperanto programita por franclingvanoj » kaj prelegoj). Kun emocio mi legis tiun spegulon de la agadoj de CDELI, nostalgie rememorante miajn proprajn bonegajn spertojn rilate kvin kulturajn seminariojn en CDELI kaj kelkajn neforgeseblajn komunajn esperantistajn migradojn.

Indas rimarkigi en la listo de prelegoj kaj seminarioj okazintaj pere de CDELI kaj de tiama KCE (sub la gvidado de Gacond) la men-

cion pri la jaro 1981 : « Andreas Juste parolis pri la origino de Ido kaj ĝia kultura disvolviĝo. » Interesajn detalojn pri la tuta serio de prelegoj de Juste, okazintaj dum 5 tagoj en 1981, ni povas trovi en la artikolo de Tazio Carlevaro, pri kiu mi komentos poste.

« Lernejoj Esperanto-korespondadoj en Svislando kaj la influo de la pedagogio Freinet »

Mónika Molnár

La artikolo de Mónika Molnár prezentas la historion de la svisaj lernejoj Esperanto-korespondadoj. La aŭtorino informas nin, ke ekde la jaro 1904 (tiom frue !) jam aperis la unuaj svisaj eksperimentoj pri Esperanto-korespondadoj en la lernejo, en la vilaĝo Les Brenets. Sed la signifa evoluo de tiuj eksperimentoj komenciĝis iom poste, laŭ la influo de la fama franca pedagogo Célestin Freinet. Jen kiel difinas Molnár la ĉefajn ecojn de tiu pedagogio : « En la Freinet-pedagogio grave estas ne enkapigi, sed praktikigi la sciojn en la reala vivo. Pri lingvolernado li diris, ke oni lernas lingvon ne por koni, sed por uzi ĝin. La motivo, kiu estas la motoro de lia pedagogio, restas la motoro ankaŭ por la lingvolernado. Kaj argumentoj ne mankis por elekti la internacian lingvon, ja Esperanto en la Freinet-movado origine estis emancipiĝilo kaj por la infanoj de la popolo kaj por iliaj instruistoj. »

La aŭtorino prezentas detale la grandskalan agadon « Grajnoj en vento » – internacia interlerneja korespondado en Esperanto, iniciatita

kaj gvidita de Marcel Erbetta. Tiu estis bone konata svisa pedagogo, kiu entuziasme uzis la pedagogion de Freinet kaj plibonigis la sistemon de interlerneja korespondado pere de internaciaj rondoj kaj serio de presitaj leterkajeroj. La kolekto de kajeroj « Grajnoj en vento » impresis profunde s-ron Gacond en ties juneco, kiam li verkis siajn du diplomlaboraĵojn kun la titoloj *Interlerneja korespondado helpe de Esperanto* kaj *Propono de eksperimenta instru-plano de Esperanto en la baza lernejo*. Gacond eksperimentis la metodon en la vilaĝo La Sagne, aliĝis al rondo de instruistoj partoprenantaj la agadon « Grajnoj en vento » kaj plibonigis la sistemon instruante al la infanoj Esperanton antaŭ la korespondado, por ke ili kapablu korespondi memstare.

La agado de Gacond estis maŝo en ĉeno daŭrigata niatempe en la lernejo « La Grande Ourse » en La Chaux-de-Fonds. Molnár estas la nuna konstanta instruistino pri Esperanto en tiu lernejo. Ŝia artikolo estas riĉe ilustrita per fotoj, i. a. montrantaj ŝiajn gelernantojn, kiuj legas la kajerojn « Grajnoj en vento ». La aŭtorino listigas kelkajn nomojn de esperantistoj aktivintaj en la instruista teamo de « La Grande Ourse » antaŭ ŝia alveno. Tiukaze, ŝi malkaŝas tre interesan detalon pri la biografio de Gacond : li estis lernanto de la eminenta instruistino Marguerite Bosserdet, kiu jarojn poste fariĝis lia lernanto pri Esperanto. Kiom belan ekzemplon tiu brava instruistino donis al siaj gelernantoj kaj ankaŭ al ties gepatroj !

Espereble, ŝiaj gelernantoj ĉiam rememoros, ke vere imitinda homo estas tiu, kiu neniam ĉesas lerni kaj neniam fermas sian koron fronte al novaj horizontoj. Kaj kiom admirindan rilaton inter generacioj ŝi belege ekzemplis : instrui la novan generacion kaj ankaŭ lerni de tiu !

Mi legis la artikolon de Molnár kun grandega intereso. Mi scivolus ankaŭ pri la manieroj, laŭ kiuj oni uzas nun interreton kaj skajpon por la internacia lerneja korespondado.

« La radio-prelegoj de Claude Gacond »

Marie-Louise Münger

La aŭtorino okupiĝas pri la radio-prelegoj de Gacond, kiujn oni elsendis inter 1962-1992. Jen kiel la aŭtorino enkondukas siajn komentojn : « En tiu ĉi artikolo mi provos ĉerpi kelkajn el tiuj fundamentaj ideoj, kiuj skulptis la personecon de Claude Gacond. Unu el la malfacilaĵoj, kiujn mi renkontis dum tiu traserĉado, estas ligita al la konduto de Claude Gacond kiel ĵurnalisto. Laŭ la maniero kiel li pritraktas la diversajn temojn, ni perceptas lin < humila >. Li preferas paroligi la aliajn ol paroli pri si mem. Pro tio ni trovas ofte lian propran penson en la enkondukoj aŭ la konkludoj de liaj elsendoj. Kvazaŭ birdo serĉanta grajnoj, mi provos eltiri kelkajn trezorojn de tiu penso. »

Marie-Louise Münger prezentas la prelegojn pri rasismo, menciante tion, ke la preleganto donas al la vorto « rasismo » tre ĝeneralan signifon, inkluzivantan diversajn formojn de ŝovinismo : « ... rasismo estas malsano, kiu ekzistas en ĉiuj

socioj, kie pluraj rasoj aŭ lingvoj, etnoj aŭ religioj kunvivadas. Rasismo eble estas unu el la plej akraj problemoj de nia epoko, ĉar ĝin naskas kolektivaj subkonsciaj reagoj. »

Tiujn vortojn diris Gacond en 1964, sed bedaŭrinde ili ankoraŭ ne perdis aktualecon. Münger komentas i. a. la radioelsendojn, en kiuj Gacond prelegas pri libro de mi nekonata, sed kiun mi nun ege scivolus legi : « En la haŭto de nigrulo » de la usona psikiatro John Howard Griffin. Tiu psikiatro eksperimentis laŭvorte la francan esprimon « esti en la haŭto de aliulo », kolorigante sian haŭton kaj poste vojaĝante tra la sudo de Usono, por serĉi laboron kvazaŭ li estus nigrulo. Liajn spertojn, pli terurajn ol li antaŭsupozis, li rakontas kaj komentas en sia libro, pri kiu Gacond prelegis. Jen kiel lia prelego en 1964 incitis mian scivolon je la fino de 2012.

La aŭtorino komentas ankaŭ aliajn gravajn temojn en la radio-prelegoj de Gacond : pri la pensmanieroj de unuarangaj intelektuloj kiel Edmond Privat, Pierre Ceresole kaj Hélène Monastier, pri monda federalismo kaj mondanismo. Tiun ĉi koncepton Gacond komentas tiel : « Ni ĉiuj konas la faman diron de Einstein : < Ni devas ŝanĝi nian pensmanieron. > Ni esperantistoj havas grandan respondecon tiurilate. Nia monda lingvo helpas nin pensi tuthomare, sed vera viva penso devige influas la agojn de siaj portantoj. Ĉu nia esperantista penso influas nian ĉiutagan vivon ? Mi ne respondos al tiu demando. Ĉiu devas respondi mem, ĉar ĉiu respondecas. » Jen ĉi-supre

fragmento de brila oratoraĵo, unu el la plej valoraj, kiujn Münger elĉerpis por ni.

Aliaj materialoj pri la historio de la esperantaj kulturo kaj movado

El la 20 artikoloj en la festolibro, 10 (do ĝuste duono) rilatas al la historio de la Esperantaj kulturo kaj movado. Pri 3 el ili mi jam komentis en la antaŭa ĉapitro, ĉar kompreneble ĉiuj materialoj pri la biografio de Claude Gacond rilatas al la Esperantaj kulturo kaj movado. Nun mi prezentos la aliajn 7.

« Edmond Privat (1889-1962) kaj lia agado por la sendependiĝo de Polujo dum la unua mondmilito (1914-1918) »

Tomasz Chmielik

Tomasz Chmielik riĉigas la festolibron per tre serioze dokumentita artikolo, pri la agado de Edmond Privat por la sendependiĝo de Polujo. En 1915, la franca gazeto *Le Temps* decidis sendi la junan svizan ĵurnaliston Edmond Privat al Varsovio, por verki artikolojn pri la eventoj okazintaj tie. Komentas Chmielik: « Ĉi tiu vojaĝo estis la komenco de la porpola kampanjo, kiu plene absorbas la junan Privat inter la jaroj 1915-1918. Certe liaj esperantisteco kaj persona konateco kun L. L. Zamenhof (1859-1917), sed ankaŭ pacamo kaj toleremo, ligitaj kun la movado ĉirkaŭ Esperanto kaj kun la intelekta kulturo de lia hejmkantono Ĝenevo, estis decidaj por tia aktivado. Precipe interesis lin tiuj principoj de interpopola konduto, laŭ kiuj formiĝos la estonta, postmilita

vivo, ĉefe por la nacioj perdintaj sian politikan liberecon. »

La materialo de Chmielik estas tiel atentokapta, kiel historia novelo. La aŭtoro enŝovas en la tekston multajn artecajn fragmentojn el la verkoj de Privat, kiuj prezentas realisme grandan panoramon de la pola socio dum tiu periodo. Ne mankas vivoplenaj dialogoj, portretoj kaj ankaŭ memorindaj dummilitaj pejzaĝoj. Mi re-citos ĉi tie unu solan fragmenton, kiu prilumas la lingvan problemon en tiu tempo :

« Unu matenon mi ĉeestis la ĝeneralajn ĉiumatenajn aŭdiencojn de la rusa guberniestro. Longa sekvantaro de kompatindaj virinoj kaj viroj atendis sian vicon kun petskribo en la mano. Unu ricevis severan riproĉon, ĉar ŝi ne scias la rusan lingvon.

– Ni estas en Rusujo ĉi tie ! – kriis la guberniestro. – Vi ne rajtas paroli pole... Foriru, lernu la lingvon ! » (El *Aventuroj de pioniro* de Edmond Privat, fragmento citita de Chmielik.)

Chmielik dokumentas sian detalan artikolon per 8-paĝa bibliografio, enhavanta i. a. manuskriptojn troviĝantajn en la biblioteko de CDELI.

« Reviziti sinjoron Sinha »

Probal Dasgupta

La kontribuo de Probal Dasgupta al la festolibro igas ĝin vere internacia antologio, ĉar sen tiu kontribuo, la libro estintus nur eŭropa. Dasgupta prezentas la vivon kaj agadon de unu el la pioniroj de Esperanto en Barato : Lakshmiswar Sinha. La aŭtoro de la artikolo asertas, ke por verki ĝin, li uzis la

aŭtobiografian libron de Sinha *Jaroj sur tero*, kune kun rememoroj pri iliaj personaj konversacioj. Sinha estis la lernanto de Tagore, kaj tiu aprezis lin, helpis kaj kuraĝigis lin. La vivo de Sinha estis ege interesa : li multe vojaĝis tra la mondo por lerni kaj instrui, verkis kaj esperantigis librojn, okupiĝis pri ĉarpentado kaj instruis ĉarpentadon laŭ sveda metodo, aktivis multe por la Movado ktp. Jen kiel resumas Dasgupta la signifon de Sinha por nia tempo : « Diference de sia epoko, kaj simile al la nia, Sinha forte emfazis la lokan iniciatemon kaj la fidadon al la simplaj fortoj de unuopuloj anstataŭ troa dependeco de centrulaj receptoj kaj de pezindustriaj-burokrataj procedoj kaj teknologioj. » La artikolo finiĝas per neatendita ŝerco : « Sinha per sia ĉarpentistiĝo el burĝa deveno signis malakcepton de la strukturoj de sia tempo, kaj etendas la manon al la nia. Eble per tio li signis ankaŭ, ke li fajfas pri tio, ĉu iuj posteuloj historiistos pri li aŭ ne ? »

« Internacia lingvo por la monda revolucio ? – Komintern kaj la Esperanto-demando »

Jean-François Fayet

Tiu estas unu el la du tradukaĵoj en la libro. Elgermanigis ĝin Reinhard Haupenthal.

« Komintern » (KI) estas la mallonga nomo de la « Tria Internacio » (1919-1943), fondita kaj gvidita de Lenino kaj poste (ekde 1926) de Stalino. Ĝin konsistigis la komunistoj, kiuj forlasis la socialistojn de la « Dua Internacio ». La artikolo de Fayet detale priskribas la grandajn

malfacilaĵojn, kiujn alfrontis la Movado dum tiu periodo.

Aparte altiris mian atenton la piednoto de la paĝo 127. Mi citos el ĝi : « De sia 2a kongreso, kiu kunigis 217 delegitojn el 37 landoj, la KI efektive konfrontiĝis kun la traduka problemo. La plej gravajn dokumentojn oni prezentis en kvar lingvoj – germana, angla, franca kaj rusa –, sed la kontribuoj ne estis tradukitaj simultane, kio limigis la diskuteblojn. » Legante tiujn informojn pri kio okazis en la jaro 1920, mi komparas ilin kun la nunaj diskutoj inter la politikistoj de EU kaj UNO kaj konkludas, ke oni ne faris grandan paŝon antaŭen. Hodiaŭ oni ja tradukas simultane, sed la nombro de lingvoj pligrandiĝis...

En la sama piednoto sekvas komentoj pri kio okazis nur kvar jarojn poste : « Post la 5a kongreso (1924) anstataŭ la germana, la rusa kiel Komintern-lingvo fariĝis pli kaj pli grava kaj ŝlosilo por karieri en la aparato. La oficialaj lingvoj de Komintern estis la rusa kaj la franca, sed kun la escepto de la franca, ĉiuj delegitoj de la unua kunsido prezentis siajn raportojn en la rusa ! »

La artikolo de Fayet estas leciono pri la pasinteco, kiu pensigas onin pri la nuno.

« Norda stelsemanto : Tiberio Morariu »

Katalin Kováts

Kiom fascinan paĝon el la historio de la Movado revivigas Katalin Kováts en sia artikolo ! Temas pri la vivo kaj agado de la elstara instruisto Tiberio Morariu, lernanto de Andreo Cseh kaj poste ties kunlaboranto.

Kia vivo ! Kia eksterordinara karaktero ! Kaj kiaj neripetebaj historiaj cirkonstancoj ! Morariu estis fervora organizanto de internaciaj kursoj per la metodo Cseh. Li multe prelegis pri Esperanto kaj pri Rumanujo, tradukis el multaj lingvoj, aktivis multe en la Movado k. a. Vojaĝante kaj instruante en multaj landoj, Tiberio Morariu kunlaboris kun steloj de la Movado kiel Lidia Zamenhof, Stellan Engholm, Lakshmiswar Sinha, Johan Rosbach kaj multaj aliaj. Li ankaŭ ekamikiĝis kun la fama sveda verkistino Selma Lagerlöf, kiu konsentis pri la esperantigo de multaj siaj verkoj kaj i. a. iĝis la baptopatrino de la filino de Morariu.

La science dokumentita prihistoria artikolo de Kováts impresis min ankaŭ kiel beletraĵo. La titolo mem ŝajnas fabela. La enkonduka alineo iel rememorigas la fabelan enkondukan ŝablonon « Iam, antaŭ tre longe, ekzistis... ». Jen kiel la kurteno leviĝas de sur la historia scenejo : « La Internacia Lingvo en 2012 iĝos 125-jara. Ĝia historio trapontas jam tri jarcentojn, periodo dum kiu estis eble unu jardeko, kiam oni vere povis imagi, ke ĝi fariĝos LA komuna lingvo de la homaro.

En tiu jardeko, ĵus antaŭ la Dua Mondmilito, danke al la tre vasta kaj bone organizita agado de Andreo Cseh kaj de liaj disĉiploj, diskoniĝis la ideo de la mondlingvo en plurdekoj da landoj, ĉefe en Eŭropo. La kvanto de personoj, kiuj partoprenis almenaŭ provlecionojn aŭ unusemajnan kurson, eĉ kun la plej singardaj taksoj superas plurajn centmilojn. »

La aŭtorino sekvas la vivovojojn de Morariu ne nur per iloj de historiisto (t. e. serioza dokumentado kaj klare racia priskribo de la historie pruvitaj faktoj) sed ankaŭ per iloj de poeto : sentoj de varma amo kaj admiro por la protagonisto. Ŝi diras tre trafe : « Kvankam la faktoj pli-malpli estas konataj, la funkciado de tiu reklammaŝino restas mistero, kaj la motoro kaj liaj helpantoj komencas forgesiĝi. »

Laŭ tiuj asertoj, Kováts klopodas kunmeti kiel eble plej signifajn historiajn faktojn, por savi el forgeso « la motoron kaj liajn helpantojn », alivorte la instruiston Cseh kaj liajn disĉiplojn, inter kiuj troviĝis Morariu. Per racio kaj per intuicio, la aŭtorino esperas eventuale pliprosimiĝi al la kompreno de la socia psikologia mistero pri « la funkciado de tiu reklammaŝino ». Evidentas, ke la scivolo de la aŭtorino estas motivita per la deziro imiti kaj daŭrigi la vivovojojn de la tiamaj heroecaj « stelsemantoj » kaj instigi al simila deziro ankaŭ la legantojn. Evidentas la simileco inter la destino de la aŭtorino kaj tiu de ŝia protagonisto, koncerne iliajn personajn vivojn (ili ambaŭ transloĝiĝis el orienta al norda Eŭropo, fondis internacian familion, kreskigis/kreskigas infanon denaske parolantan Esperanton, sentis/sentas la saman nostalgion pri la denaska lando kaj la proksimaj parencoj) kaj iliajn instruistajn karierojn (ili ambaŭ vojaĝis/vojaĝas por instrui Esperanton kaj prelegi pri la Esperantaj lingvo kaj kulturo kun granda pasio ; Kováts organizas niatempe ankaŭ bonegajn virtualajn

kursojn pere de la paĝaro *edukado.net*). La aŭtorino estas unu el la plej entuziasmaj kaj efikaj « stelsemantoj » de nia periodo. La similecoj de destinoj verŝajne logis la aŭtorinon al la studado de tiu biografio kaj helpis ŝin kompreni tre profunde kaj plurflanke la vivon de Morariu.

En la epilogo de la artikolo, la aŭtorino demandas sin kun emocio, kia estintus nia mondo nun, se la Dua Mondmilito ne interrompintus la evoluon de tiu entuziasma amasa « stelsemado », celanta amikecon kaj interkomprenon inter ĉiuj homoj.

La artikolo de Kováts trafis mian koron laŭ neforgesebla maniero. Ni esperu, ke la homaro sukcesos lerni el la lecionoj de sia historio kaj imitos la bonajn ekzemplojn de la pasinteco.

**« Kritika analizo
de la revuo *La suda stelo* »**

Josip Pleadin

Josip Pleadin prezentas en sia artikolo la historion de la grava jugoslava revuo *La Suda Stelo*, kiu aperis inter 1932 kaj 1973. Interrompoj de ĝia apero okazis tri foje: inter decembro 1933 kaj marto 1934, ĝi ne aperis pro malkonkordo en la Movado; inter marto 1941 kaj novembro 1947, la dua mondmilito malhelpis ĝian eldonon; inter aŭtuno 1961 kaj februaro 1964, ĝi ne aperis pro financa krizo. Tamen, neniu el tiuj obstakloj sukcesis definitive neniigi la revuon. Kio okazis do en 1973, kiam *La Suda Stelo* ĉesis aperi? Kiu teruraĵo evidentiĝis esti pli forta ol la malkonkordo, la mondmilito kaj la financa krizo? La respondo estas

ridinde simpla kaj aperas klare ĉe la fino de la unua parto de la artikolo: malaltiĝis la kvalito de la revuo. Diras Pleadin: « ... pro tio ankaŭ malgrandiĝis nombro de ĝiaj abonantoj. Tio kaŭzis ankaŭ ĝian definitivan finon en la jaro 1973. »

Jen grava leciono por nia tempo: ni nepre zorgu pri la kvalito de la nunaj revuoj, se entute ni volas plu havi ilin.

La lasta duono el la artikolo de Pleadin estas statistiko pri la jar-kolektoj de la revuo *La Suda Stelo*. Ĝi listigas la jarojn de eldono kaj la paĝnombrojn, la nomojn de la redaktintoj, la presejojn, la ŝanĝojn de subtitoloj kaj la ŝanĝon de titolo. (Ĉi tiu ŝanĝo okazis inter 1-3/1960 kaj 2/1961, dum la periodo kiam la revuo kunfandiĝis kun la japana revuo *Prometeo*, redaktita de Miyamoto Masao. Tiam, la revuo nomiĝis *La Suda Stelo – Prometeo*. Pleadin asertas, ke dum tiu intervalo, la revuo « ricevis plene internacian noton. ») Tiu statistiko estas valora laboraĵo pri biblioteka dokumentado.

« La fenomeno Arthur Baur »
Dietrich Michael Weidmann

Tiu biografia artikolo okupiĝas pri brila svisa ĵurnalisto, kiun Dietrich Michael Weidmann nomas « la plej eminenta alemana esperantisto de la tuta ĝisnuna historio de Esperanto. » La titolo devenas el la fama libro de Arthur Baur, « La fenomeno Svislando », disdonita en 1979 inter la partoprenintoj de la 64a UK en Lucerno. Weidmann rakontas per tre varma tono pri la familia vivo de Baur, pri ties ĵurnalisa kariero, pri ties verkoj koncerne la alemanan, la

romanĉan kaj Esperanton, pri ties agadoj en la Movado ktp. Plej profunde impresis min la personaj rememoroj de Weidmann pri Baur. Jen citaĵo ĉi-rilate : « En privata interparolo kun mi en la jaro 1985, kiam ni estis najbaroj, ĉar mi loĝis en domo apud la lia, Arthur Baur foje esprimis al mi, ke li vidas en Svislando modelon por estonta mondfederacio. »

Legante la artikolon de Weidmann, mi rememoris konatan eldiron, kiun mi aŭdis dum miaj oftaj vojaĝoj tra la svisaj kantonoj : « La plej granda riĉaĵo de Svislando estas la svisoj. » Kaj vere tio, kion mi pleje admiras pri tiu lando, estas la homaj kvalitoj de ties loĝantaro. Laŭ mia vidpunkto de eksterlandano, la « fenomeno Svislando » estas fakte fenomenaro, kiun konsistigas miloj da homaj fenomenoj renkontiĝeblaj ĉiupaŝe tra la lando.

Kompreneble, Baur estis unu el la plej admirindaj kaj ekkonindaj el tiuj fenomenoj. Mi kredas, ke la alta kvalito de la homoj naskis altkvalitan federalismon, kaj ankaŭ inverse, la federalisma sperto edukis eksterordinarajn homojn en ĉiuj svisaj kantonoj.

**« Nobel-premio por Zamenhof ?
Retrovita letero de
Louis de Beaufront »**
Irmí Haupenthal

Irmí Haupenthal publikigas en la festolibro fotokopion pri eltrovita letero de Louis de Beaufront, en kiu tiu proponas, ke Ludoviko Zamenhof ricevu la Nobel-premion. La letero estis sendita en 1905. Ĝi montras al

ni alian flankon de la personeco de de Beaufront ol tiun pri kiu oni kutime aŭdas aŭ legas. La aŭtorino atentigas nin pri tio, ke oni kutimas paroli pri Louis de Beaufront laŭ ŝablonoj, aliformante lin en miton kaj neglektante ekkoni la historian veron pri lia enigma personeco. Irmí Haupenthal substrekas : « Strange kaj tipe : neniam iu verkis biografion pri li : ŝajnas, ke oni atendis, ke la tempo-paso forviŝu ne nur la memoron, sed eĉ ajnan spuron kaj dokumenton. »

Mi legis tion pensante, ke tiu mistera markizo de Beaufront (i. a. oni pridubas ne nur lian nobelan titolon sed ankaŭ lian familian nomon !) povus inspiri ne nur historiistojn sed ankaŭ roman-istojn...

**Pri planlingvoj, pri la rilatoj
inter ili kaj inter ties kulturoj**

Kvinono el la 20 artikoloj en la festolibro (do 4 artikoloj) rilatas al interlingvistiko kaj al rilatoj inter la kulturoj de diversaj planlingvoj.

**« Planlingvistiko : eta sed riĉa
revuo pri interlingvistiko »**
Detlev Blanke

Tiu artikolo prezentas la revuon *Planlingvistiko*, difinita en la titolo mem kiel « eta sed riĉa revuo pri interlingvistiko ». En la komenco, la aŭtoro prezentas ĝeneralan panoramon pri ĉiuj Esperantaj revuoj pri interlingvistiko, inkluzive tiujn, kiuj ne plu aperas. Ene de ĉi tiu kategorio, Detlev Blanke selektas por prezentado la revuon *Planlingvistiko*, aperintan inter 1981 kaj 1986. Jen kiel la aŭtoro ekkonatigas nin kun tiu periodaĵo : « Ĉi-rilate apartan

rolon ludis kaj daŭre ludas la literatura revuo *Literatura Foiro* (ekde 1970), kiu ofte aperigas interlingvistikajn materialojn kaj pro tio, por certa tempo, klopodis meti tiujn materialojn en apartan revuon: *Planlingvistiko*. » Blanke klare asertas, kial li celas inciti intereson pri tiu periodaĵo: « La revueto *Planlingvistiko* estas relative nekonata, aparte por novaj interlingvistoj. Ĉar ĝi entenas vere valoran materialon, estus utile represi la kajerojn aŭ/kaj enretigi ilin. »

Mallonga historio pri la uzado de la termino « planlingvistiko » klarigas al ni la fakton, ke iam oni uzis ĝin kiel sinonimo de « interlingvistiko ». Pri la enhavo de la revuo, la aŭtoro komentas: « La kompleta listo de la fakartikoloj kaj recenzoj donas bonan superrigardon pri la enhavo de la revuo. Tamen impresas du eterne diskutataj temoj, nome la landnomoj [...] kaj la supersignoj. »

La lasta duono el la artikolo estas detala bibliografio pri la enhavo de la revuo *Planlingvistiko*.

« **Andreas Juste kaj la rilatoj inter Esperanto kaj Ido** »

Tazio Carlevaro

Tre profunde impresis min la artikolo de Tazio Carlevaro pri la poeto Andreas Juste, kiu verkis en la lingvo Ido. La teksto de la artikolo enhavas citaĵojn el la poemoj de Juste, kiujn eblas legi kaj en la Ida versio kaj en la Esperanta versio farita de Carlevaro. Tiamaniere, oni povas kaj admiri la belsonan originalon kaj kompreni la sencon.

Mi rekopios ĉi-sube kelkajn citaĵojn, kiuj aparte impresis min. Temas unue pri la versoj en kiuj, rememorante la famajn vortojn de la protagonisto de Sofoklo, Juste esperas, ke la vera homa naturo estas bona. Se malamo estas nur malfeliĉa akcidento, indas havi senton de kulpo ĉu por nutri ĝin en si mem, ĉu por igi ĝin ĉe aliulo: « Ĉu ni aŭdos sen honto la iamajn vortojn / de la juna Antigona, kiu, per sia voko, / nin ĉiutempe altiros per slogano subluma, / < Ne por malamo mi naskiĝis, sed por amo. > »

Jen aliaj antologiaj versoj, priskribantaj la senton de respondeco, kiun Juste sentis por la « Blanka Stelo » (tiu ĉi estas la simbolo de Ido): « Vana ne povas esti tiom granda ardo, / kaj kiam venos la aŭroro plej alta / kaj lasta, kiun sekvos plu neniu vespero, / venos la florado de tiu longa espero. / Tiam leviĝos la nubozaj kurtenoj / por la kompanoj de la Blanka Stelo. »

El la artikolo ni ekscias, ke Juste legis du poemojn de esperantaj poetoj, kiuj (ne malice kaj fakte tre kortuŝe) priskribis la sorton de poeto verkanta en jam mortanta lingvo. La koncernaj poemoj celas tute abstrakte ajnan idistan poeton, sen nomi tiun. Sed Juste, kiu estis tre sentema rilate sian fervore amatan lingvon, sentis sin kvazaŭ rekte alparolata kaj reagis per tre emociigaj versoj. Li skribis i. a. : « Kaj min ne perturbu, verdaj kuzoj, / Lasu ke min aŭdu trankvile la Muzoj. »

En aparta ĉapitro de sia artikolo, Carlevaro prezentas interesajn detalojn rilate la kvintagan seminarion

pri Ido kaj la Ida kulturo, okazintan en 1981 en La Chaux-de-Fonds, organizitan de Claude Gacond, pere de CDELI kaj KCE. La sola preleganto estis Juste, kiu parolis ĉiumatene pri la Ida lingvo kaj ĉiuposttagmeze pri la Ida kulturo. 16 personoj partoprenis tiun seminarion. Carlevaro citas fragmenton el la raporto de la idisto Jacques Bol (en la Ida revuo *Progreso*), kiu tre bone prilumas la rolon de Gacond koncerne al la rilatoj inter esperantistoj kaj idistoj. Mi re-citos la fragmenton, elidigitan de Carlevaro en la piednoto : « Kvankam ni idistoj, ĉe nia alveno, sentis nin iom kvazaŭ Mormonoj en Vatikano, laŭ la esprimo de nia instruisto, ni devas agnoski, ke ni akceptiĝis tre afable, eĉ tre varme, far de la estro de la Centro, kiu faris ĉion eblan por komfortigi niajn restadon kaj kunsidojn, kaj helpi al ni. »

Kun granda respekto kaj admiro, Carlevaro prezentas al ni ne nur la poeton, sed ankaŭ la homon Juste. Plej multe pensigis min la jena biografia detalo : « Andreas Juste revis pri poetado en la valona lingvo, t. e. en sia loka (belga) latinida dialekto. Tion li rezignis, kiam li malkovris, ke la dialektoj estas ofte uzataj por verkoj malmoralaj. » Jen signifa historia fakto. Oni ofte forgesas, ke lingvo ne ekzistas sen komunumo. Kiu malkontentas pri iu lingva komunumo, tiu sentas ankaŭ deziron forlasi ĝian lingvon, aŭ almenaŭ ne uzi tion kiel lingvon de kreado. Jen subjekto, kiu povas inciti nin al plua meditado.

« La ideoj de la francaj lingvistoj Jacques Damourette (1873-1943) kaj Edouard Pichon (1890-1940) pri la artefaritaj lingvoj »

Sébastien Moret

Sébastien Moret baziĝas en siaj komentoj sur la verkoj publikigitaj de tiuj du aŭtoroj kune, dum la periodo inter la du mondmilitoj. Li ankaŭ uzas multajn recenzojn kaj komentojn de aliaj tiutempaj lingvistoj, pri la pensmaniero de la duopo. Temas pri du lingvistoj, kiuj fervore malapogis kaj malaprezis la ideon mem de ne-etna lingvo. Moret prezentas la personecojn kaj la ideojn de Damourette kaj Pichon, kun la senpasia precizo de historiisto. Sian intereson pri la lingvista duopo, Moret klarigas tiel : « Krom en specialaj rondetoj, tiuj ĉi lingvistoj ne estas tre konataj. Tamen, Damourette kaj Pichon estis tre originalaj personoj en la intermilita Francujo, kaj iliaj ideoj, same originalaj, estas indaj je analizo. »

Moret klopodas klarigi la ĝeneralan pensmanieron de la du francaj lingvistoj, kiuj konsideris lingvon subkonscia kreaĵo de la nacio parolanta ĝin. Ili tiom fanatike kredis je la unueco inter etno kaj lingvo, ke ili eĉ atingis la absurdan konkludon, ke libron pri la franca gramatiko kapablas verki nur franco ! La plurlingveco en si mem ŝajnis por ili malkonsilinda, ĉar laŭ ili, homo kiu scipovas pli ol unu lingvon povus ekŝanceliĝi rigarde la ĝustan uzadon de sia propra ! Laŭ ilia rezonado, se oni bezonas unu helpan lingvon por internaciaj rilatoj, tiu povus esti nur... la franca ! Laŭ iliaj vortoj,

artefaritaj lingvoj estas « unu el la plej gravaj atencoj kontraŭ la originaleco, la fortikeco kaj la digno de la homa pensado. » (Mi rekopiis tiun fragmenton el ilia pasia pledo, kiu troviĝas en la fino de la artikolo de Moret.)

Moret atentigas nin ekde komence pri tio ke, feliĉe, en la sama periodo, ekzistis famaj lingvistoj, kiel ekzemple Jan Baudouin de Courtenay, Otto Jespersen, Hugo Schuchardt k. a., kiuj forte kontraŭis la ideojn de Damourette kaj Pichon.

Ni rememoru, ke malgraŭ la ideoj de Damourette, Pichon k. a., dum la sama periodo atingis la pinton de siaj karieroj famaj esperantistoj kiel Julio Baghy, Kolomano Kalocsay, Stellan Engholm, Johan Rosbach, Andreo Cseh, Lidia Zamenhof, Tiberio kaj Eugenia Morariu, Lakshmiswar Sinha k. a. Mia persona konkludo : ne la fervorajn atakojn de lingvistoj aŭ pseŭdo-lingvistoj ni devas pritimi, sed ja la neglekton kaj silenton rilate la fenomenon Esperanto...

« Zamenhof kaj Volapük »

Gonçalo Neves

La verko de Gonçalo Neves impresis min kiel altvalora kontribuo al la historio de la kreado de Esperanto kaj al la esplorado de la vivo de Zamenhof. La aŭtoro pritraktas la rilatojn inter Zamenhof kaj la lingvo Volapük. Neves celas prilumi la cirkonstancojn en kiu Zamenhof konatiĝis kun la lingvo de Johann Martin Schleyer (kiam kaj kiomgrade Zamenhof konatiĝis kun la lingvo Volapük) kaj ankaŭ kiamaniere (se en-

tute) Volapük influis la kreadon de Esperanto. La artikolon akompanas 198 piednotoj kaj 7 paĝoj de bibliografio. Tiuj elementoj jam diras multon pri la seriozeco de la teksto. La verko de Neves estas verŝajne la rezulto de multaj jaroj de pasia studado kaj multeflanka longa dokumentado. Ni ne preteratentu ankaŭ la finan noton de la aŭtoro, en kiu li dankas al Jean-Claude Caraco kaj Reinhard Haupenthal pro ilia helpo rilate fakan revizion kaj dokumentadon.

Tiu artikolo, kiu aspektas tiom impona el scienca vidpunkto, estas ankaŭ tre atentokapta eĉ por « laika » leganto, kiel ekzemple mi. Mi legis kun vera ekscito la detektivan rakonton, kiu aperas malantaŭ la historiaj informoj. Kiel detektivo, Neves kunmetas diversajn spurojn pri la esplorata periodo : li studas leterojn, artikolojn, librojn, vortarojn kaj en unu kazo eĉ... pridemandas atestanton ! Tio okazas, kiam li skribas, ke neniu scias, ĉu Schleyer legis la ekzempleron de *La unua libro* en la germana (kiun Zamenhof sendis al li kun dediĉo). Neves akompanas tiun aserton per la piednoto 70, kiu tekstas tiel : « Dank' al informo de la antaŭa posedanto de tiu libro, ni scias nur, ke Schleyer ne prinotis ĝin nek makulis aŭ difektis ĝiajn paĝojn (telefona sciigo 2008-11-24). »

Kiel detektivo, Neves uzas ne nur materiajn pruvojn, sed ankaŭ siajn logikon kaj psikologian intuicion por malkovri la veron. Kaj pere de sia literatura talento, la aŭtoro konstruas vivoplenajn, psikologie versimilajn situaciojn kaj portretojn. Antaŭ niaj

okuloj, Zamenhof kaj Schleyer iĝas protagonistoj de historia novelo aŭ eĉ de filma scenaro, dum la logika fadeno de la scienca argumentado deruliĝas precize, akompanata de prilingvaj tabeloj kaj piednotoj.

Resume, Neves argumentas, ke Zamenhof konis bone la lingvon Volapük, kiu ja influis lin (eĉ tre multe) en la lasta etapo de la kreado de Esperanto. Ĝi verŝajne influis iom la sistemon de verba konjugacio, sed ĝia ja grava influo koncernas la kreadon de la vortradikoj. Kvankam ege interesa, tiu ĉi influo restis longtempe nerimarkita, ĉar Zamenhof verŝajne ne elĉerpis radikojn el Volapük (laŭ Neves), sed uzis tiun lingvon malrekte : li rimarkis la difektojn de la Volapüka sistemo de radikokonstruado kaj tiel sukcesis plibonigi sian propran lingvon, klopodante senigi ĝin (pli-malpli) de la samaj difektoj. Tiel klariĝas la granda diferenco inter «Lingvo Universala» («Lingwe Uniwersala», la zamenhofa lingvo de 1881, neniam publikigita) kaj «Lingvo Internacia» (la definitiva versio de 1887, kiu famiĝis sub la nomo «Esperanto»).

Jen memorinda fragmento el la artikolo, priskribanta tiun krucvojon en la vivo de Zamenhof :

«Kiam Zamenhof < pli proksime ekkonis > la lingvon de Schleyer, lin ja ŝokis la leksika mutilado de la germana prelato, sed samtempe lin konsternis la subita konstato, ke li mem ekiras la saman danĝeran vojon ĉe Lingvo Universala, ke ankaŭ multaj el ties vortoj fariĝis apenaŭ rekoneblaj post liaj unusilabigaj stucoj.

Li verŝajne eĉ rimarkis, ke iuj volapükaj vortoj estas pli rekoneblaj aŭ pli etimo-konformaj ol la ekvivalentoj de Lingvo Universala (...) Se Volapük tiel ŝokis lin, ĉu ankaŭ lia Lingvo Universala ne ŝokos la klerulan mondon ĝuste pro la sama kialo ? Tial Zamenhof flankenlasis la libron de Schleyer kaj reiris al sia laboro... sed li prenis alian direkton. Kelkajn jarojn poste, jam preta ricevi la juĝon de l' mondo, lia Lingvo Internacia montros renovigitan vizaĝon. »

Tri piednotoj (154, 155 kaj 156) akompanas la supran citaĵon, sed mi ne kopios ilin, lasante al la scivolemuoj la plezuron serĉi ilin en la libro.

Mi ĵus citis la fragmenton, kiu verŝajne algluiĝos al mia memoro plej bone. Tiu momento en la vivo de Zamenhof pruvas laŭ mi la fakton, ke la kapablo rimarki difektojn ne estas tro granda virto tiom longe, kiom ĝi celas nur la verkojn de aliuloj. Ĝi ja fariĝas ege valora kaj fruktodona talento, kiam oni turnas la pinton de la kritiko en la direkton de sia propra verko. Kaj Zamenhof ĝuste tion sukcesis fari.

Materialoj por dokumentado

Kiel jam menciite, Josip Pleadin kaj Detlev Blanke dediĉas po duono el siaj artikoloj al biblioteka dokumentado.

Claude Gacond aldonas al la festolibro bibliografion pri siaj verkoj en la franca, tial mi kalkulis ankaŭ lin inter la 24 kontribuantoj al la libro.

Reinhard Haupenthal aldonas bibliografion pri la verkoj de Claude Gacond en Esperanto.

Tri artikoloj en la festolibro rilatas al dokumentado. Pri tiuj mi komentos ĉi-sube.

« La biblioteko de Prelato Johann Martin Schleyer (1831-1912) »

Reinhard Haupenthal

La artikolo de Reinhard Haupenthal dokumentas pri la historio de la biblioteko de Prelato Johann Martin Schleyer, ekde sia forpaso en 1912 ĝis nun – do, dum ĝuste jarcento. La tuta ĉeno de vendoj kaj aĉetoj estas skizita en klara diagramo. La aŭtoro mem estis maŝo el tiu ĉeno, tial li tre bone konas ĝin. El la artikolo rezultas, ke preskaŭ la tuta biblioteko de Schleyer troviĝas nun en kvar bibliotekoj: en la germanaj urboj München (ĉe Bavara Ŝtata Biblioteko) kaj Lauda-Königshofen (ĉe Hejm-Landa Muzeo), en Aŭstrio (ĉe Aŭstria Nacia Biblioteko en Vieno) kaj en la svisa urbo La Chaux-de-Fonds (ĉe la biblioteko de CDELI, kie la repondeculo estas Claude Gacond). La celo de la artikolo estas atentigi pri tio, ke ekzistas ankaŭ kelkaj materialoj el tiu fonduso, ankoraŭ neakiritaj de ajna publika biblioteko, kaj indus ke tiuj materialoj jam estu akiritaj, por la uzo de esploristoj.

« La planlingva kolekto de Ramon Molera (1922-1983) »

Ana María Molera

La aŭtorino estas la filino de la forpasinta Ramon Molera Pedrals, grava kataluna esperantisto kaj libro-kolektanto. Tiu fondis la librokolekton, kiu iom post iom pligrandiĝis kaj aliformiĝis en privatan bibliotekon por publika servo. Ana María

Molera riĉigas la dokumentan materialon per mallonga sed emociiga biografio pri sia patro, kune kun ties foto. Priskribante la historion de la biblioteko, la aŭtorino rakontas amuzan okazaĵon pri la nekutima memoro de sia patro: « La katalogado de la revuoj estis en lia memoro. En aprilo 1971 li suferis aŭtomobilan akcidenton. Tuj kiam mi alvenis al la hospitalo li diris: « Ne timu, trankviliĝu, mi fartas bone, vidu, de *La Suno Hispana* mankas n-ro: 68, 69, 89, 90. *Heroldo de Esperanto* estas kompleta. *Esperanto Triumfonta* de la jaro 1920 mankas 2, 5, 6... ». »

« La inkunabloj de Esperanto »

Adolf Schmidt

Tiu ĉi artikolo estas tre speciala: ĝi estis publikigita unuafoje en 1931, do ĝi okdekjariĝis kune kun la jubileo! Ĝi aperis tiutempe en la revuo *Zentralblatt für Bibliothekswesen* (Centra revuo por bibliotekaj aferoj) en Leipzig. Ĝia aŭtoro, Adolf Schmidt, apartenis al la generacio de Zamenhof (li vivis inter 1860 kaj 1944). La artikolo estas unu el la du tradukaĵoj en la libro, kaj elgermanigis ĝin Annakris Szimkat. Danke al ties traduko, Schmidt fariĝis unu el la 24 kontribuantoj al la libro. La aŭtoro komentas pri la unuaj libroj en Esperanto, kiuj eldoniĝis dum la 19a jarcento. Laŭ Schmidt, tiuj libroj fariĝis jam raraĵoj en 1931, kaj ilia konservado devis iĝi objekto de intereso por bibliotekoj. Nun, pluraj el ili troviĝas en la biblioteko de CDELI.



Claude Gacond instruante per sia metodo (fotomuntaĵo de Mónica Molnár).

Esperanta gramatiko

En la festolibro troviĝas du artikoloj pri Esperanta gramatiko, kaj ambaŭ okupiĝas pri verbo.

« Verbaj strukturoj en Esperanto kaj rimarkoj pri ilia instruado »

Ilona Koutny

La aŭtorino substrekas : « Ĉio, kio esprimeblas en etnaj lingvoj, esprimeblas ankaŭ en Esperanto ; tiel kutime la verbo ludas aktivan rolon en la priskribo de situacioj : ĝi esprimas tempon, modon, voĉon, leksikan aspekton. Per sia semantik-bazita valento ĝi alligas al si aliajn frazpartojn. » Ilona Koutny prave rimarkas, ke la transitiveco estas problemo, kiu necesigas instruadon pere de komparo kun la denaska lingvo. Ĉiu lernanto devas memori pere de specialaj ekzercoj la Esperantajn verbojn, kies transitiveco malkongruas kun tiu de la ekvivalentaj verboj en la denaska lingvo.

Laŭ mi, estus tre oportune se, uzante tiun artikolon kiel deirpunkton, oni enŝovu apartan paĝaron en la programon « lernu ! » pri la uz-

maniero de verboj el la vidpunkto de transitiveco. Tie, ĉiu lernanto povus trovi en sia denaska lingvo liston de verboj, kies Esperantaj ekvivalentoj postulas malsimilan uzmanieron.

« Diakrona evoluo : La senpera verbigo de adjektivoj kaj substantivoj »

Herbert Mayer

Tiu artikolo pritraktas la historian evoluon de fenomeno tre tipa por la nuna lingvo Esperanto : la « senpera verbigo » de adjektivoj kaj substantivoj. Laŭ Herbert Mayer, en la komenco, tiu fenomeno aperis nur malofte, precipe en poemoj, kiel artece aŭdaca lingvouzado. Jen unu el la plej malnovaj ekzemploj : « He, kial vi, sinjoro bestofel' ! / Vi arogantas tiel arlekeni. » (El « Faust » de Goethe, tradukita en 1896 de Kofman ; citita de Mayer.)

La aŭtoro rimarkas pli oftan uzadon de tiu rimedo kun la paso de tempo. Li konstatas, ke dum la intermilita periodo, en ekspresionismaj poemoj, la verbigo de adjektivoj kaj substantivoj abundas. Jen bela ekzemplo : « Rapide. / Streĉver-

vas muskoloj... / Posthorizontas la suno, / Krepuskas la kor' / en sopiro. // Golgotas la vivo. / Nigras du krucoj. » (El « Ajno » de Eŭgeno Miĥalski, publikigita en poemaro en 1929 ; citita de Mayer.)

Laŭ la aŭtoro, la fenomeno de « senpera verbigo » akiris grandan popularecon en la ĉiutaga vivo danke al la detektivromano « Ĉu vi kuiras ĉine ? » (1976) de Claude Piron. Pri tiu romano komentas Mayer : « Tiu verko estas turnopunkto en la evoluo de la originala prozo : Fariĝis modo legi. Oni devis koni ĝin, se oni apartenis al la tiama junulara movado. » Kaj poste, pri la stilo de tiu romano, Mayer asertas : « Preskaŭ ĉiu-paĝe svarmas tiuj senperaj verbigoj. »

Legante tion, en mian memoron revenis la versoj de fama poemo (vaste disvastigita poste de la muzikgrupo « Kajto »), kiun Piron verkis pli-malpli en la sama periodo kiel la supremenciita romano : « La soldato kiu marŝas / en la vento / en silento / sur la vojo kiu marĉas / sian korpon ne plu sentas. // Lia menso fakte brutas, / nur la laco / kaj l' agaco / de la pluvo kiu glutas / senkompate lin turmentas. » (El « La soldato kiu marŝas » de Claude Piron, publikigita en la poemaro *Malmalice* 1977.)

Metodiko de lingvoinstruado

« La metodo Cseh : mitoj, fortoj kaj malfortoj »

Renato Corsetti

Unu sola kontribuo en la festolibro okupiĝas pri metodiko de lingvo-instruado. Se ĝi mankintus, tiam mankintus ege grava diskut-

temo en la festolibro, pri unu el la plej signifaj kampoj de agado en la vivo de la jubileulo. (Ankaŭ la artikolo de Mónica Molnár rilatas al lingvoinstruado, sed el pedagogia vidpunkto : motivi la lernantojn lerni uzi Esperanton kiel ilo de porpaca edukado ktp. Nur la artikolo de Renato Corsetti fokusiĝas al konkreta metodika vidpunkto.)

Corsetti substrekas la fakton, ke Andreo Cseh ne estis la kreinto de la rekta metodo, sed nur adaptis ĝin al la konkretaj cirkonstancoj de sia tempo : « Esence la metodo Cseh estas unu el la multaj rektaj metodoj de la komenco de la pasinta jarcento. Tio, kio estas vere konsterna, estas, ke la metodo neniel evoluas, kaj male al la rekomendoj de Cseh mem, ankoraŭ hodiaŭ oni prezentas al tiuj, kiuj volas lerni la metodon, materialon de Cseh de la jaro 1929a. »

La aŭtoro skizas la historion de prilingvaj instrumentoj, kun diversaj modoj aperintaj kaj malaperintaj, ofte interplektiĝintaj. Pri la nuno, Corsetti asertas : « ... oni konsideras, ke ne ekzistas metodo absolute ĉiam valida. La metodo, konsistanta el elementoj de la pluraj metodaj aroj, estas inventenda ĉiufoje. Oni konsideru por tio ĉefe la instruiston kaj lian kapablon kaj la lernantojn kaj iliajn interesojn. »

Corsetti konkludas optimisme : « La ideo instrui Esperanton per rekta metodo ne mortas. Kaj ĝi estos transformata de pli junaj instruistoj al io alia, kiu superos la mankojn ĝis nun spertitajn. » Mia sperto pri instruado de la angla kondukis min al similaj ĝeneralaj opinioj pri

fremdlingva instruado. Mi aldonu, ke mi spertis la rektan metodon ankaŭ kiel lernanto. En 2005, mi eklernis Esperanton pere de la programo « lernu ! », elektante unuavice la rekt-metodan kurson « Bildoj kaj demandoj », kreitan de Hokan Lundberg, desegnititan de Helen Claesson kaj registritan de Arono Chapman. Mi konsideras ĝin bonega kurso, ĝuebla kaj tre efika, tajlorita ĝuste laŭ miaj tiamaj personaj bezonoj. Mi estas tre danka al la teamo, kiu kreis ĝin. Tamen, mi ja konis personojn, kiuj preferis aliajn kursojn ofertitajn de la programo « lernu ! ». Tio pravas la fakton, ke lernantoj havas malsimilajn bezonojn kaj preferojn, do la instruistoj de « lernu ! » prave decidis doni la eblecon elekti inter kelkaj kursoj. La komputiluzado malfermas novajn perspektivojn pri lingvolernado, kiuj koncernas i. a. la rektan metodon, sed ne nur ĝin. Kaj ĉi-rilate nepras mencii ankaŭ la interesajn eksperimentojn pere de « Dua Vivo ».

Mi tutkore kundividas kaj apogas la optimismon de Corsetti koncerne la ĝeneralan evoluon de la nuna pli kaj pli fleksebla kaj adaptebla vizio pri lingvolernado.

Konkludo

La festolibro *Instrui Dokumenti Organizati* helpis min plilarĝigi miajn konojn kaj akiri novajn inspirojn. Ĉirkaŭ du trionoj el la materialoj de tiu libro pritraktas subjektojn, kiujn mi ne konis antaŭ la legado, do la koncernaj aŭtoroj malŝlosis por mi novajn pordojn. La materialoj rilatantaj al subjektoj, kiujn mi pli-malpli ja konis antaŭe, ebligis al mi ricevi

pli da detaloj kaj kompreni novajn vidpunktojn. Al tiu kategorio apartenas la artikoloj pri la Esperanta verbo kaj pri la svisa movado. Unu sola materialo pritraktas subjekton, kiun mi jam tre bone konis antaŭe : la rektan metodon de lingvoinstruado. Ĝia legado donis al mi la plezuron kompari la opiniojn de la aŭtoro kun la miaj.

Je la 27a de aŭgusto 2011 okazis la jubilea festo, kiam Claude Gacond oficiale ricevis la festolibron, eldonitan tre elegante de Irmi kaj Reinhard Haupenthal ĉe ilia eldonejo Iltis. Pli ol 100 personoj el 10 landoj ĉeestis la feston. Tio fariĝis ankaŭ okazo por propagandi Esperanton en la kanton Neuchâtel, kie Gacond estas bone konata kiel esperantisto, pedagogo kaj eksa politikisto.

En sia varma salutvorto, publikigita komence de la libro en la franca, Jacques-André Humair diras tre trafe : « La devizo de Svislando estante < Unu por ĉiuj, ĉiuj por unu ! >, kaj Claude Gacond, al kiu estas dediĉita tiu verko, estante larĝe ilustranta la unuan parton de tiu bela moto metinte sin je la servo de la esperantistoj, al ni konkretigi la duan. » (Mi ĵus citis el la Esperanta versio, elfrancigita de Martine Schneller. La tradukaĵo aperis en la ĉarma festa numero de la revuo *SES Informas*, redaktita de Richard kaj Martine Schneller kaj disdonita dum la jubilea festo.)

Por ke libro vivu, ne sufiĉas ke ĝi estu verkita kaj eldonita, nepras ankaŭ ke ĝi estu legata. Tial mi entuziasme rekomendas la legadon de tiu kleriga kaj inspirodona libro.



Svisa kalendaro

Ankaŭ vizitu la retan version de la kalendaro prizorgata de Luko Allemand

www.svisa-esperanto-societo.ch/kalendaro

Marte

4 : **Lausanne** : LES-kunveno.
6 : **Genève** : La Stelo-kunveno.
16 : **La Chaux-de-Fonds** : CDELI-Studsabato.
21 : **Basel** : ESB-kunveno : Skrablo.
21 : **Staad (SG)** : Prelego de Mireille Grosjean.
23 : **Staad (SG)** : Ĝenerala Asembleo de SES en la restoracio « *Weisses Rössli* » sekvata de vizito de la *Markthalle* konstruita de Hundertwasser en Altenrhein.
29 ĝis **aprile 2** : **Métabief** : SAT-Amikara-Kongreso.

Aprile

1 : **Lausanne** : LES-kunveno.
10-14 : **Genève** : Esperanto-tablo en *Salon des Inventeurs*.
20 : **La Chaux-de-Fonds** : CDELI-Studsabato.
22 : **Basel** : ESB-kunveno en St-Louis.

Maje

6 : **Lausanne** : LES-kunveno.
23 : **Basel** : ESB-kunveno en Islingen.
25 : **La Chaux-de-Fonds** : CDELI-Studsabato.

Junie

15 : **La Chaux-de-Fonds** : CDELI-Studsabato.
15 : **Lausanne** : LES : ekskurso.
23 : **Les Brenets** : Prelego de prof. Kimuro Goro.
24 : **Basel** : ESB-kunveno en St-Louis.

Julie

1 : **Redakta datlimo de SES-informas**.
3 : **Wil** : EK-vizito de la turo de Wil.

Aŭguste

25 aŭ **septembre 1** : ESB-kunveno.
31 : **Biel/Bienne** : **Postsomera kunveno** : Muzeo Robert kaj ŝipado al la Insulo Sankta Petro.

Septembre

1 : **Lausanne** : LES-kunveno.
4 : **Will** : EK-kunveno.
26 : **Basel** : ESB-kunveno : Niaj someraj ferioj.

Oktobre

10 : **Redakta datlimo de SES-informas**.
28 : **Basel** : ESB-kunveno en St-Louis.

Organizantoj de kursoj kaj stud-kunvenoj

Basel : Esperanto-Societo Basel : PF 178, 4005 Basel, tel : 0049 76 214 57 12.

La Chaux-de-Fonds : CDELI, Bibliothèque de la Ville, strato Progrès 33, CP 3034, 2303 La Chaux-de-Fonds. claudio.gacond@ne.ch, tel : 032 967 68 42.

CDELI-Studsabatoj : Aliĝo ĝis la mardo antaŭ la koncerna studsabato ĉe Nancy Fontannaz : Rete: nancy.fontannaz@gmail.com, tel : 021 728 31 27.

Lausanne : Laŭzana Esperanto-Societo : esperanto@citycable.ch tel : 021 647 29 28.

Genève : Grupo La Stelo : CP 734, 1212 Grand-Lancy 1, tel : 022 771 24 37.
kaj Asocio Esperanto-Genève-Régions : esperantoegr@gmail.com

Wil : Esperanto-Klubo : <http://esperanto.ch/wil>

Atentu ! *La Svisa Kalendaro* videblas aliflanke de tiu ĉi kovrila paĝo.



Fotis Stefano Keller kaj Richard Schneller.

La 2an de februaro la Asembleo de la Asocio de la Amikaro de CDELI grupigis 16 apogantojn. Post atenta ekzameno kaj akcepto de la ŝanĝotaj punktoj de la Statuto, ili elektis novan trimembran komitaton, kiu konsistas el Claude Gacond, prezidanto, Martine Schneller kaj Stefano Keller, kaj novan kasiston : Danielle Carrier kaj du kaskontrolantojn : André Sandoz kaj Sonia Bétrix. La komitato rajtos larĝiĝi. Detalan raporton ricevos la membroj de la Asocio.